
# La Krokodil'

**Informilo de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo**

**n°53 aprilo 2009**

**EN ĈI TIU NUMERO:**


Krespoj kaj ludoj ĉe la fervojistoj ...................... 1
Ludoj en Esperanto ............................................1
Un tour du monde en vélo et en espéranto ......... 2
Enigmo ............................................................ 2
*L'agenda:*
En avril ............................................................ 3
En mai ............................................................. 3
En Bjalistoko por unu jaro (1a parto) .................4


## Krespoj kaj ludoj ĉe la fervojistoj

Sabaton posttagmeze, la 28an de februaro, la tuluzaj esperantistoj estis invititaj en la lokalo de la fervojistoj (2, avenuo de l'Hers) por kunmanĝi krespojn (februara tradicio) kaj ludi en esperanto.

Kunvenis 14 homoj kaj eĉ pli da krespoj, kaj da boteloj, tiel ni povis bone kompari la diversajn receptojn kaj specojn de cidroj.

Pri la ludoj, kelkaj malkovris la esperantan nekompletan version de la ludo "New Amigos", kelkaj provis samopinii (sed ne ĉiam sukcesis), kelkaj skrablumis, dum aliaj serĉis la perditajn domenojn…



Estis tre bona etoso kaj restis kelkaj trinkaĵoj, do ni malpacience atendas novan inviton!

***Marion Quenut***

## Ludoj en Esperanto

Ĵaŭdon la 19an de marto 2009 kunvenis ses esperantistoj en "le Bâton à Palabres" alidirite la Domo de la Parolo. Tie okazas ĉiumonate diskutoj en la angla aŭ la itala lingvo. Unuan fojon en januaro 2009 ekestis luda vespero en esperanto, en kiu partoprenis 15 esperantistoj, kiuj ludis samtempe ĉirkaŭ tri aŭ kvar tabloj.

En la dua tia renkontiĝo (marto 2009) ludis nur ses geamikoj: René kaj Hélène, geestroj de la trinkejo "Le Bâton à Palabres", Severin kaj Marion de EKC, Liliane kaj Jacques, membroj de la fervojista asocio. Marion kunportis en sia tornistro ses ludojn.

Unue ni ludis triope: ĉirkaŭ unu tablo "tabuon", ĉe alia tablo "New Amigos". Poste, ĉiuj kune ronde ludis "Tik, tak, boum" en ridiga etoso. Jen priskriboj de la tri ludoj:

En "Tabuo" unu ludanto elprenas karton kaj legas ĝin kaŝe. Supre estas vorto, kiun li provos divenigi

*La Krokodil'* estas la papera versio de nia blogo, legebla en la retadreso:
http://lakrokodil.wordpress.com/
Ĉiuj tekstoj de ĉi tiu bulteno jam aperis en la blogo La Krokodil'. Legadu ĝin, kaj kontribuu sendante tekstojn, fotojn, aŭ komentante la jamajn artikolojn!

al aliaj ludantoj. Sube estas kvar vortojn, kiujn li ne rajtas uzi dum sia parolado. Ekz : HUNDO/besto, animalo, kato, boji.

“New Amigos”: oni jam povis ludi en la angla kaj la hispana lingvoj. Dank’ al Marion kaj Christophe de Tuluzo, tiu ludo funkcias ankaŭ kun kartaro en esperanto. Ĝi estas agrabla rimedo por kontroli siajn konojn kaj eklerni plu la lingvon. Ĉiu ludanto povas elekti unu el tri lingvaj niveloj. La kartoj temas pri vortprovizo, dialogoj, esperanta movado…

“Tik tak Boum” nomiĝas la lasta ludo. Kial? Paciencon, baldaŭ vi ekscios. Iu aperigas karton al ĉiuj, sur ĝi legiĝas ekzemple “fri” aŭ iu alia silabo. La unua ludanto tenas umon, sferan objekton en sia mano, li ŝaltas ĝin, tuj ni aŭdas "tik tak tik tak…”. Jen li cerbumas kaj elparolas vorton entenantan “fri”, ekz : fripono aŭ afriko… kaj rapide transdonas la umon al sia maldekstra najbaro, kiu diras alian vorton (ekz. : frititaĵoj), ktp…Se iu tro longe cerbumas la umo subite povas eligi eksplodan bruon. Tiam vi ĵus perdis!

***Jacques Caubel***

# Un tour du monde en vélo et en espéranto



Une postière originaire de Narbonne, Rose et un policier en région parisienne, Cyrille sont partis aujourd’hui de Narbonne pour deux ans de périple sur la planète…à l’aide de leurs vélos et de l’espéranto!

Allez sur le blog pour trouvez le lien vers l’article de la dépêche du midi.

Et allez visiter Le site de leur voyage pour découvrir leur projet et pour suivre toutes leurs aventures

Le vélo et l’espéranto, une vieille histoire d’amour !

## ENIGMO

- Lazaro, lia edzino kaj ilia filino volas transpasi riveron.
- La kanoto ne povas elteni pezon pli ol 100 kilogramoj.
- Lazaro pezas 80 kg. Liaj edzino kaj filino pezas po 40 kg.

***Kiel ĉiuj tri transpasis la riveron?***

*(respondo en la posta Krokodil')*



## Appel à Volontaires !

**L'information auprès du public est essentielle si nous souhaitons faire progresser l'Espéranto.**
**Tout au long des mois de mai et juin, l'association aura besoin de volontaires pour tenir des stands dans des manifestations importantes telles que le festival Camino ou le festival de la Terre, ou bien le Forom des Langues de Toulouse. Contactez Kiki :**

**06 31 68 00 26**
**05 61 62 39 48**

# L'AGENDA

## En Aprilo

**du 11 au 14 avril 2009 :**
***64ème Congrès de SAT-Amikaro, à Pau.***
L'évènement majeur du mois d'avril, près de Toulouse.




**Mardi 14 avril :**
**Conversation en espéranto au café « Jo de Bruges »**
Horaire : 19h30
Lieu : Café Jo de Bruges, 17 rue de Toul (pl. Arnaud Bernard) au 1er étage.
Objectif : pratiquer la langue.
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**24 et 25 avril 2009 :**
***FESTIVALO DE ESPERANTO-MUZIKO EN BARCELONO***
Lieu : Centre Artesà Tradicionàrius.
* 24 avril, concert de JOMO KAJ LIBERECANOJ et bal de KAJ TIEL PLU
* 25 april, concert de DUOBLE UNU bal de MARIANTA (musiciens de KAJTO)

**Mardi 28 avril :**
***Conversation en espéranto au café « Jo de Bruges »***
Horaire : 19h30
Lieu : Café Jo de Bruges, 17 rue de Toul (pl. Arnaud Bernard) au 1er étage.
Objectif : pratiquer la langue.
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Du 30 avril au Broni**
**Lieu : rintempa Renkontiĝo de KEJ**
Labortagoj kun atelieroj, debatoj kaj prelegoj pri lingvoj, de diverseco kaj paco.

## En Majo

**30an de aprilo, 1a, 2a kaj 3a de majo 2009, Barcelono : Printempa Renkontiĝo de KEJ**
Labortagoj kun atelieroj, debatoj kaj prelegoj pri lingvoj,de diverseco kaj paco.

**Lundi 04 au jeudi 07 mai: stand de l'association EKC dans le village européen**
Dans le cadre de la semaine de l'Europe organisée par la Mairie de Toulouse
Horaires : 10h00 à 19h00 sauf le jeudi 10h00 à 12h00
Lieu: Rue Alsace Lorraine, sortie du métro

**Mardi 05 mai : *Panorama actuel de l'espéranto, présentation publique***
Horaire : de 19h00 à 20h30
Lieu : l'ENSEEIHT, près de Saint-Aubin
Qu'est-ce que l'espéranto ? Combien de personnes le parlent et dans quels pays ? Pourquoi apprend-on l'espéranto et dans quels domaines est-il utilisé ? Y a-t-il des livres, de la musique, etc...en espéranto ? C'est à ces questions fréquemment posées sur la langue, et à d'autres encore, qu'est destinée cette présentation..
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Du 7 au 11 mai 2009 : *Le congrès national d'espéranto à Troyes (Aube).***

**Sam /dim 09 et 10 mai - *Week-end Découverte (et pratique) de l'espéranto***
Horaire : du sam. 10 h. au dimanche 17 h.
Lieu : Gîte La Maraude, 09800 ARROUT.
Objectifs : 3 niveaux, débutants et conversations 1 et 2
Déroulement : 10 h de cours, à répartir sur les deux jours. Soirée avec jeux et films en espéranto. Hébergement dans chambres de 3 ou 6 lits.
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Mardi 12 mai : *Conversation en espéranto au café « Jo de Bruges »***
Horaire : 19h30
Lieu : Café Jo de Bruges, 17 rue de Toul.
Objectif : pratiquer la langue.
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Kiki : 06 31 68 00 26 / 05 61 62 39 48

**Mardi 12 mai : *début d'un 5ème cours express***
Horaire : à 19h tous les mardis
Lieu : l'ENSEEIHT
Objectifs : s'initier en 6 semaines à l'espéranto.
Organisateur : EKC
Contact : Marion 06 87 64 75 84

**Samedi 16 mai :** ***Fête des langues de Castanet***

**Dimanche 17 mai :** ***Fête des langues de Montauban***.

***Mardi 26 mai : Conversation en espéranto au café « Jo de Bruges »***
Horaire : 19h30
Lieu : Café Jo de Bruges, 17 rue de Toul.
Objectif : pratiquer la langue.
Organisateur : Asso Bilingue
Contactez: Kiki : 06 31 68 00 26 / 05 61 62 39 48

**Jeudi 28 mai :** ***Soirée spéciale jeux au bâton à palabres***
Horaire : 20h00
Lieu : Le bâton à palabres, 15 rue de Thionville
Objectif : pratiquer la langue en jouant
Tarif : 2 euros, une boisson sans alcool offerte
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Dimanche 31 mai :** ***stand de l'association EKC lors du forom des langues du monde***
Horaire : 9h00 à 19h00
Lieu : Place du capitole
Pour aider sur le stand voir l'encart en page 2.

# En Bjalistoko por unu jaro (1a parto)

Post longa 26-hora veturado, la buso en kiu mi sidas fine preterpasas la ŝildon "Białystok"! Post kelkaj pliaj minutoj, mi elbusiĝas en la neĝon kiu kovras la busparkejon.

En tiun urbon nome konatan de ĉiuj esperantistoj, mi venis por unu jaro de aktivado kiel eŭropa volontulo por la Bjalistoka Esperanto-Societo. La programo "Eŭropa Volontula Servo" ebligas al ĉiuj junuloj ĝis la fino de sia trideka jaro, realigi projektojn eksterlande por maksimume unu jaro. Ĉiujn kostojn pagas Eŭropa Unio: la veturkostojn, la loĝadon, la manĝadon, ktp… Kaj ĉiuj volontuloj krome ricevadas ĉiumonate iom da poŝmono.

En Tuluzo, EKC jam ricevis por 10 monatoj junan Bjalistokanon, Przemek, kiu multe aktivis por la asocio kaj ĝiaj membroj. Antaŭ lia reiro, Przemek anoncis ke la Bjalistoka Esperanto-Societo siavice serĉas volontulon gastigotan en la fama naskiĝurbo de Zamenhof.

Mi interesiĝis pri tiu unika ŝanco.

Post pluraj monatoj de preparado, la projekto estis akceptita de la responduma komisiono. La 27an de februaro 2009, mi enbusiĝis al Pollando!



Ĉe mia alveturo, atendas min Przemek kaj, surprize, du geesperantistoj el Varsovio: Irek kaj Agnieszka, kiuj tiutage en Bjalistoko partoprenis organizan kunsidon pri UK. Ni tuj festas la okazon ĉirkaŭ kelkaj bieroj!

Mian unuan tagon en Bjalistoko, Przemek trakondukas min al ĉiuj lokoj gravaj por esperantisto. Unuafoje mi konatiĝas kun loka indiĝeno (vidu supre, la foton). Tre baldaŭ venos la sekvo de mia rakonto!

*Christophe Chazarein*

**Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo**
*Centre Culturel Espéranto de Toulouse*
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél. : 05 61 62 39 48 — 06 31 68 00 26
esperanto.toulouse@free.fr
http://esperanto.toulouse.free.fr